

Emanuel Geibel,
Kio estas feliĉo?

tradukita de Manfredo Ratislavo

Efemeraĵo estas la
feliĉ' kaj estis ĉiam ;
hastante tra la mondo ja
vi ne ĝin kaptos iam.

Kantante sur herbejon vin
kuŝigu vi prefere;
kaj eble vi renkontos ĝin
falantan el-aere.

Sed tiam ĝin kaptu kaj tenu ĝin,
ne multe vi intermiksiĝu ;
vi ne hezitu, por ke ĝi je l' fin'
subite ne ree foriĝu.

*Traduko de la Germana poemo "Was ist Glück?" de Emanuel Geibel en Esperanton de MANFREDO RATISLAVO (Manfred Retzlaff, Stettiner Str. 16, D-59302 Oelde, Germanio, *1938-11-04).*

Arg-277-561 (2005-02-01 22:08:04)